Langlet är bland annat känd som en av de drivande krafterna i den stora räddningsaktion för judar och andra av nazisterna förföljda personer som genomfördes i Ungern under slutet av andra världskriget. När Nazityskland ockuperade Ungern 1944 hade paret Langlet redan bott i landet i över tio år. Valdemar hade översatt ungerska böcker till svenska. Paret hade alltså inga problem med att tala ungerska. Genom sin position som kulturattaché på den svenska legationen i Budapest och som varandes Svenska Röda Korsets delegat i Ungern kunde han tillsammans med sin hustru Nina hjälpa till att rädda tusentals personer från nazisternas förföljelser genom att utställa svenska skyddsdokument och föra flyktingar till hus och kloster som låg under Röda Korsets beskydd. Valdemar och Nina förlorade allt de ägde i Budapest och flyttade till Sverige efter att den sovjetiska armén nått fram till Budapest. Valdemar blev 1944 av prins Carl utsedd till chefsdelegat för Svenska Röda Korset, då Folke Bernadotte inte fick tillstånd av den ungerska regeringen att komma. Hus med Röda Korsets skyltar respekterades för det mesta av nazisterna – men inte alltid. Makarna Langlet stod, efter de s.k. pilkorsarnas maktövertagande i oktober 1944, på "dödslistan". De kom i alla fall lyckligt hem till Sverige, men helt utan pengar. Så småningom fick Valdemar en liten pension av staten som tack för sina insatser. Nina arbetade som pianolärare, men hemmet var fattigt.

Det finns mycket mer att berätta, men jag kan förmedla kontakt med Agneta Emanuelsson, om du vill köpa hennes skrift.

*/Siv Burell*



## La sanktulino Brigito (Birgitta), prelego en Gotenburgo dum la Internacia Virina Tago, la 8an de marto

Kune Andreas kaj Margareta prelegis pri la sanktulino de tuta Eŭropo, nia Brigito, kiu fondis novan kongregacion kaj, per sia filino la beata Katarina, la monaĥejon en Vadstena. La inaŭguro okazis en 1384.

Ni esperantoklubanoj kun intereso aŭskultis la prelegon la 8an de marto pri tiu unika

virino, kiu dank' al revelacioj kun mezaĝoj de Dio, tre influis la politikon, ne nur en Svedio, sed ankaŭ en Eŭropo.

Ingegerd faris la bildojn pri Andreas Nordström kaj Margareta Andersson.

En [Ora Ĵurnalo n-ro 75](#), p. 22, vi povas vidi tekston kaj bildojn de la prelego.



Andreas kaj Margareta finis la prelegon per la Preĝo de Birgitta:

**HO SINJORO**, venu baldaŭ kaj lumigu la nokton. Kiel mortantaj sopiras, tiel mi sopiras al vi. Diru al mia animo ke nenio okazas, sen via permeso, kaj ke nenio kion vi permesas estas senkonsola. Ho Jesuo, Filo de Dio, vi kiu staris senparola antaŭ viaj juĝantoj, retenu mian langon, ĝis mi povos pripensi kion kaj kiel mi parolu. Montru al mi la vojon, kaj donu al mi la volon iri ĝin. Estas riske heziti kaj danĝere plui. Do plenumu mian deziron kaj montru al mi la vojon. Mi venas al vi, kiel la vundito venas al la kuracisto. Donu, ho Sinjoro, al mia koro pacon. Amen.

### La preĝo de Birgitta



# Sankta Brigito, profetino kaj sanktulino, en la preĝejo de Alingsås

de Siv Burell



En **Christinæ Preĝejo**, Alingsås, oni la 22an de februaro festis la sanktulinojn Brigito.

Kun multe da identiĝo la aktorino **Stina Ekblad** legis la tekstojn.



**Schola Gothia**, vokala kvarteto plenigis la tutan preĝejon per siaj voĉoj.

La kvarteto kantis gregorianan plurvoĉan muzikon el la 14a kaj 15a jarcentoj. La mezepokaj tekstoj faris ke oni sentas mondon de pasio kaj novaj sonoroj.

Birgitta Birgersdotter de Svedio (1303–1373), poste sankta Brigito, estis persono kiu gajnis famecon kaj respekton tra tuta Eŭropo. Naskita en la nobelaro, ŝi ne hezitis prelegi por reĝoj. Ŝi persvadis la papon moviĝi al Romo. Ŝi peris por interpacigi inter militoj sur la kontinento.

Sankta Brigito enmiksitis sin en kaj grandaj aferoj kaj etaj detaloj.

Pri la vestoj de la monaĥinoj ŝi tre ekzakte priskribis ĉion.

Ŝiaj pli ol 600 vizioj kondukis al ŝia kanonizado dek ok jarojn post ŝia morto.

Fine mi citas kelkajn el la tekstoj, kiujn Stina Ekblad recitis:

## **Ave maris stella**

Estu sankta, stelo de la maro, ho milda patrino de Dio  
Ĉiam senmakula Virgulino, pordego de la ĉielo, vi beata.

La nomo de Eva estas inversigita al "Ave" de la anĝelo  
Paco denove povas kunigi la teron kun la ĉielo.

## **Gaude Birgitta**

Ĝoju Birgitta, ricevu nian laŭdan kanton, konduku nin el la valo de malfeliĉo al malvarmeto kaj paco.



## **Ave maris stella**

Hell dig havets stella, o Guds milda moder  
Alltid rena Jungfru, himlens port, du sälla.

Evas namn blir omvänt genom ängelns "Ave"  
Fred kan åter sluta jord och himmel samman.

## **Gaude Birgitta**

Gläd dig Birgitta, mottag vår hyllningssång, led oss från olyckans dal till svalkan och friden.

## Missus Gabriel

Ŝi, kiu naskas, ne konas la patron,  
Kaj ŝi kiu neniun viron spertis  
suferis nek doloron nek grandan penon  
kiam ŝi naskas sian filon.

Vi aŭdas la signon de la nova interligo:  
Nur kredu, kaj tio sufiĉas!  
Vi ne rajtas malligi lian ŝuŝnurojn.

Granda kaj stranga signo estas en la arbetaĵo  
kaj en la fajro  
Neniu aliru mallerte  
kun ŝuoj sur la piedoj.

## Rubens rosa

En la polvo kaŝiĝas la altvalora oro,  
kiu solvu la mondan ŝuldon  
kiam Kristo kuŝiĝas en la teron  
kaj oni ne plu kredas je la vivo.

Sed la espero de la junulino ne estingiĝis,  
kvankam la homamasoj neis  
sola ŝi fidele gardis,  
fidante la potencon de la Sinjoro.

La kolombo kiu portis al Noa  
sian mesaĝon pri savo baldaŭa,  
proklamis la novan pacon,  
kiu fluis de lia Patrino, kore pura.

## Rubens rosa latine

### Rubens rosa på latin



## Missus Gabriel

Hon, som föder, känner inte fadern,  
Och hon som ingen man har känt  
lider varken plåga eller vedermöda  
när hon föder sin son.

Du hör det nya förbundets tecken:  
Tro blott, och det är nog!  
Du har inte rätt att upplösa hans skorem.

Ett stort och märkligt tecken finns i busken  
och i elden  
Må ingen nalkas oskickligt  
med skor på fötterna.

## Rubens rosa

I stoftet göms det dyra guld,  
som skulle lösa världens skuld  
då Kristus läggs i jorden ner  
och man ej tror på livet mer.

Men jungfruns hopp ej slocknade,  
fast skarorna förnekade  
allena hon höll troget vakt,  
förtröstande på Herrens makt.

Den duva som till Noa bar  
sitt budskap om en räddning snar,  
förkunnade den nya fred,  
som strömmade från hans Moder ren.

3.

A  
I-le- lú- ia.  
O Ma-rí- a, rubens ro- sa, de-li-  
cá-tum lí-li- um; dulcis, mi- tis, et formó-  
sa, summum ce-li gáudi- um; tu cella Christi  
lu-ci- da tu, vi-tis co- pi- ó- sa; exáu- di nos mí-  
se-ros, et o-ra pro no- bis. Pi- a  
et perduc nos ad fí-li- um tu- um, Vir- go Ma-rí- a.

# Bibliotekaj trovitaĵoj

de Saliko (Raita Pyhälä)

En Helsinki/Helsingfors troviĝas preskaŭ 40 bibliotekoj. La ĉefa urbobiblioteko nomiĝas *Oodi* (pretiĝis en 2018), proksime al la *Ĉefa fervoja stacidomo*. En Oodi oni povas ne nur serĉi kaj prunti librojn sed ankaŭ havigi al si kvietan laborejon aŭ ĉambron por oficiala kunsido, ludigi siajn etulojn surtapiŝe interparolante kun aliaj gepatroj, profiti de kafejo kaj restoracio, legi multlingvajn aforismojn sur muro, renkontadi geamikojn, aŭskulti muzikon. Bibliotekoj ne plu estas lokoj, kie oni nur silentu. Ĉiutage la pruntintoj redonas pli ol 1300 (ne)legitajn librojn, kiujn la bibliotekistoj trafoliumas por kontroli, ke ili estas nedifektitaj kaj puraj.



## Io kion ili trovis

Kelkajn el siaj plej surprizaj trovitaĵoj la bibliotekistoj eksponas sur tabulego en baza etaĝo, kiun nur la stabo rajtas eniri. La tabulego larĝas 7 metrojn kaj altas 3 metrojn.

En la gazeto *Helsingin Sanomat* 21.2.2025 aperis fotoj kaj artikolo pri ĝi. Inter la plej neatendeblaj aĵoj en la redonitaj libroj troviĝas ekzemple monbiletoj finnaj kaj fremdlandaj, identigiloj (tiuajn la biblioteko povas redoni al la pruntintoj), kvitancoj, kombilo, ŝtrumpeto, medikamentaj piloloj,

rentgenfoto pri ies ovarioj, kondomujo, razila klingo, orempurigiloj, tranĉaĵo el tre grasa kaj sala kolbaso *meetwurst*, buterpano, por ne mencii kartojn, slipetojn, fotojn kaj verajn legmarkilojn. En iu poemaro la leganto manskribis siajn proprajn poemojn, evidente esperante legontaron. Kelkfoje la trovitaĵo povas eĉ timigi: bibliotekistino trovis en la kontrolenda libro drog-injektilon plena de droga likvaĵo. Nova maniero disdoni kaj vendi drogojn.

Saliko



Artikolo de mia hungara Esperanta amikino **Korsos-Ferencné Kati**, pri la historio de Ombrello. Mi legis ĝin kaj trovis ĝin interesa. *Raita Pyhälä*



## La Historio de la Ombrello

La ombrello el oriento ekiris al ĝia konkera vojo. La ombreloj originitaj el Ekstremoriento donis ŝirmon kontraŭ la sunradioj kaj la pluvoj. La unua reproduktado estas konata el Ĉinio el la 11-a jarcento a. K.

Sur la tombo de la cezaro Ĉiu Ĉin Ŝi Huang-ŝi videblas la ĉaro de la Argilarmeo, sure oni sekure fiksas la ombrelon donantan ombron en la jaro 210 a.K.



Laŭ la arkeologiaj trovaĵoj la ombreloj defendantaj kontraŭ la bruligitaj sunradioj estis uzitaj en Babilonio kaj en Egiptio jam en la epoko de la faraonoj. En la antikva epoko en Japanio kaj Ĉinio estis granda kulto pri la bambukanfustojn havantaj majstraj, artkvalitaj ombreloj, kiuj pretiĝis el kolorigita silko aŭ el densteksita kotono.

En Eŭropo pli malfrue disvastiĝis la praktika ilo, kiu ŝirmis kontraŭ la sortoŝanĝoj de la vetero. La unuan ne rigidan refermeblan ombrelon la brita John Beale patentigis en la fino de la 18-a jarcento en 1786.






Sekvis la lumperiodo de la ombreloj, nome ĝis 1840 ĉ. 40 diversajn ombrelojn patentigis la inventistoj. Sed la longajn tenilojn de ĉi tiuj ombreloj ankoraŭ ne eblis kunŝovi. La inventado de la kurta, moderna, eta, kuntirebla ombrelo atendiĝis mem preskaŭ dum unu jarcento. En la departemento Vas en la strangnoma vilaĝo Ostffyasszonyfa naskiĝis en 1881 la talenta Karolo Balogh.

Li en Sárvár lernis la maŝinmuntistometion, poste en Sopron, Vieno kaj Badeno evoluigis sian scion kaj metis majstroekzamenon en 1905. Post la unua mondmilito kun sia frato Kolomano ili maŝinmuntistan uzinon malfermis en la Vas-departementa vilaĝo Uraiújfalu. Krom la tagaj rutinlaboroj ili kaprompis pri novecigoj. Ĉi-maniere naskiĝis komence de la 1920-aj jaroj la genia ideo de la kunŝovebla eta ombrelo, kiu trovas lokon en aktaĵoj. Ili en 1923 patentigis la inventaĵon.



Ostffyasszonyfa.

La dokumento pri la fabrika marko estis legitimite per la reĝa notario de Szombathely. La kunŝovebla ombrelo baldaŭ ricevis patentan protektatecon en la najbaraj Aŭstrio, Germanio, kaj ankaŭ en Pollando, Belgio kaj Francio. Poste ĉi tio okazis en Britio kaj Usono. La fratoj



komencis la fabrikadon en Uraiújfalú, kaj ili persiste serĉis hungarajn fabrikantojn. Malgraŭ la reklamoj ilia penado estis sensukcesa.

Do ilia atento turniĝis al eksterlando. Tie oni rapide rimarkis la eminentan komercan eblecon kaŝatan en la inventaĵo. La patentaj licencioj plimultiĝis. La poŝombrelo konkeris la mondon, dume hejme oni forgesis la nomon de la trovemaj hungaraj inventistoj.



Sed antaŭ nelonge en Uraiújfalú oni revivigis la memoron de la Balogh-fratoj.

La vilaĝo fieras pri la fratoj, oni aranĝas ombrelo-festivalojn memorigante, ke la kunŝovebla ombrelo ĉi tie komencis sian konkeran vojon.



Uraiújfalú.

# Letero de Espoir Kasati, Lubumbaŝi, DR Kongo



*En pli fruaj numeroj de ORA ĴURNALO ni legis pri la vivo de Espoir Kasati. Li daŭre studas komputikon, nun havas edzinon kaj translokiĝis al nova apartamento.*

***Espoir Kasati***  
*till mig, Martin, Vida, Alfred*

Kara Siv,

Mi tre ĝojas legi vian mesaĝon. Same ĝojas ke finfine vi trovas komforta la domon en kiun vi translokiĝis. Jes, certe, vi jam estas maljuna kaj tiu via granda domo bezonis pli da zorgo ol via forto povas oferti!

Post mia vizito ĉe Martin Strid mi ĝojis viziti vin kvankam ne eblis longe resti en Gotenburgo, sed almenaŭ mi eluzis la okazon por plenumi unu el mia plej granda amaso da revoj: renkonti miajn amikojn!

Post Gotenburgo mi kongresis kun aliaj junuloj en Ŝventoji, kie min renkontis Vida, ŝiaj Edzo kaj Filino fine de la kongreso. Mi pasigis kvin tagojn da vera turismo en Litovio. Jes, vere turismi ĉar mi vizitis ĉiujn iamajn kaj nunajn ĉefurbojn de Litovio. Turismumis de Sudo al Nordo de Oriento al Okcidento. Poste

mi iris buse al Aŭstrio. Mi estas bonŝanca ke mi estas supozeble la unua afrikano kiu jam vizitis la ĉi-jaran UK-urbon, Brno!

En Aŭstrio ĉe Alfred simile estis granda ĝojo por mi renkonti Alfred-n kaj lian familion.

Nu, kara Siv Burell, esperas mi ke en via nova domo, estas nova vivo. Mi deziras al vi sanon, pacon kaj forton.

Amike,  
*Espoir Ngoma Kasati*

Eterna movadumanto. Membro de Afrika Komisiono de UEA. Komitatano C de TEJO. Komitatano B de UEA-komisiito de TEJO pri Edukado, Landa kaj Faka Agado. Esperantista instruisto. Respondeculo de kongra ilei-sekcio pri instruado kaj trejnado. Loĝas en Lubumbashi/DR. Kongo

[https://uea.org/vikio/Kategorio:Nova%C4%B5oj\\_-\\_Espoir\\_NGOMA\\_KASATI](https://uea.org/vikio/Kategorio:Nova%C4%B5oj_-_Espoir_NGOMA_KASATI)

## Argumento por Esperanto

*En Libera Folio Marc van Oostendorp skribis:*



Trump donis novan argumenton por Esperanto en 4 marto 2025:

Vidpunkto – Eble en ĉi tiuj malcertaj tempoj ne plu estas tiom absurda la ideo pri lingvo kiu povus unuigi anstataŭ disigi la homaron. La usona prezidento Donald Trump kaj vicprezidento J D Vance lerte uzis la ilon de potenco nomata "lingvo" dum sia renkontiĝo kun la ukraina



prezidanto Volodimir Zelenskij lastvendrede. Ili celo estis timigi kaj superruzi sian kunparolanton.

Kaj la fakto, ke la konversacio okazis en la angla, donis al ili klaran avantaĝon.

Aŭskultante anglalingvajn paroladon en la lastaj jaroj, oni rimarkis, ke li plibonigis sian lingvaĵon por pli efike plenumi sian diplomatan rolon.

Ĉu Trump aŭ Vance regas aliajn lingvojn krom la angla restas nekonate. Ili profitis de sia denaska lingvo, lingvo por starigi lingvan baron kontraŭ Zelenskij, kiu bezonis frakcion de sekundo por vortumi siajn pensojn pli. Tiun mallongan momenton ili lerte utiligis.

**Kiel ni esperantistoj do agu, por plirapidigi la uzon de Esperanto?**

/Siv

## Por nia engaĝiĝo kiel esperantistoj, ni demandas nin en la spirito de Immanuel Kant:

*Kion ni povas scii, fari, esperi – kaj kiuj ni estas vere?*

Philipp Sonntag / ELBB 1/2025



Dum miloj da jaroj, multaj homoj tra la mondo sentis sin preme minacataj. Ili stoike alkutimiĝis al ĝi. La planedo estas en la antaŭ-civilizacio. Bedaŭrinde, ĉi tio estas konsiderata sufiĉe normala por multaj homoj.

Tute ne estis normala por L. L. Zamenhof. Lia ilo por racia paco estis Esperanto. Li invitis nin esti la esperantistoj, la esperplenaj. Tio estis mirinda perspektivo de sukcesa feliĉo.

Same nia antaŭcivilizacio nun (!) tute ne estas normala por nia Prezidanto de UEA Duncan Charters, ("Novjarajn Bondezirojn", Esperanto 1397(1) Januaro 2025, paĝo 3):

"La jaro 2024 estis plurilate konsterna por la enloĝantoj de nia mondo. Granda plimulto de esploristoj pli la mondo klimato notis pli ekstremajn fenomenojn, kiu avertas ke ni ne sufiĉe progresas pri la daŭripova konservado de nia planedo por stontaj generacioj.

Paralele katastrofa estis multloka daŭrigo de militado, kaj la neatingo de paco por suferantaj popoloj, kiuj sopiras kaj rajtas al normale trankvila vivo sen minacoj perdi familianojn, najbarojn aŭ la propran vivon."

Duncan Charters postulas larĝan engaĝiĝon kun Esperanto. En intervjuo (en paĝoj 10–14 de la sama numero 1/2025) lia tutmonda engaĝiĝo evidentiĝas.

La defio: "Kompreneble" nacioj reprezentas interesojn. Por la homaro, oni unue devus anstataŭigi la "Unuiĝintajn Naciojn" per la "Unuiĝintaj Homoj". Ili venus de malsamaj nacioj sed sentus sin kiel komuna grupo. Kiel familianoj, kiuj kvankam suferas streson sur troloĝata planedo, ofte sukcesas helpi kaj konsoli unu la alian.

Kiam L. L. Zamenhof komprenis, ke ni ne sukcesas fari ĉi tiun progreson, li disvolvis Homaranismon, sian filozofion de praktika etiko. Tamen, dum pli ol cent jaroj ni vane provis. Kiel ni povas eliri el ĉi tiu blokiĝo? Alia filozofo faris fundamentajn konsiderojn pri tiu ĉi dilemo. Kun la helpo de la kvar bazaj demandoj de Immanuel Kant, ni povas esplori, strebi, testi kaj finfine klarigi niajn sociajn rolojn:

Kion mi povas scii? Kion mi faru? Kion mi povas esperi? Kio estas viro?

Do ni ni esperantistoj konsideru kial ni apenaŭ socie aktivas ĉi-rilate. Tial ni pripensu: Ĉu ni estas tro stultaj? Tro resignacie maldiligenta? Ĉu ni portas nian nomon maljuste? Kiuj ni estas tamen?

Sekve, mi elektas ĉi tiujn kvar demandojn por trakti defiojn. L. L. Zamenhof iam 1890 vidis: Nacioj tra la mondo provas, plejparte vane, solvi konfliktojn. Nacioj reprezentas malsamaj interesojn. **Per homaranismo oni povas kaj devus eĉ anstataŭigi la "Unuiĝintajn Naciojn" per la "Unuiĝintaj Homoj",** kiuj venas de malsamaj nacioj. Eble sufiĉus, ke la 193 nacioj en **UN atenti malpli al siaj naciaj interesoj kaj pli al la "homaj" interesoj.** Do granda defio, kun multe por fari. Homoj estas en prepara stadio de civilizo. Pri tio, por helpi, por forlasi ĉi tiun antaŭan etapon, kapablas eble ankaŭ ni **Esperantistoj. Ni ne estas pli bonaj ol aliaj homoj. Sed ni ricevis unikan aliron de L.L.Zamenhof, nome "homaranismo".**

Problemoj kaj krizoj estas fortaj tutmonde. Kiajn eblojn ni esperantistoj havas por kontribui al plibonigoj per nia konstrua mondriĝardo? Evidente estas pluraj aspektoj por konsideri.

Mi selektas kvar ekzemplojn pri traktado de defioj. Uzante la kvar fundamentajn demandojn de Immanuel Kant, ni povas esplori, strebi, provi, kaj finfine klarigi niajn sociajn rolojn. La ekzemplaj provoj iras en kvar ĉapitroj, por nuntempo:

**1. Kion ni povas esperi? Kiel ni povas levi esperojn? Konstruu esperojn!**

**2. Kion ni povas scii? Kio devus resti senŝanĝa, sed esti uzata pli bone?**

**3. Kion ni faru? Eŭropo bezonas "simpla eŭropana lingvo"**

**4. Kio estas la homo? Kun Homaranismo inter ekzistecaj riskoj kaj etikaj esperoj.**

**Konkludo:**

**A) Ni devus paroli Esperanton malrapide, laŭte kaj klare.** Tio estus pli bone ricevita mesaĝo, pri kiu Esperanto evidente kaj klare kapablas. Kaj iuj aŭskultantoj eble respondas pli bone rimarkante tion, kion ni provas implici. Do bonvolu paroli "simpla Esperanto" tio povus helpi ĝin starigi eĉ pli bone ol antaŭe kiel "simpla eŭropa lingvo". Kaj kelkaj aŭskultantoj reagis rimarkante tion, kion ni sugestas al ili: bonvolu paroli "simpla Esperanto", kiu povus starigi sin eĉ pli bone ol antaŭe kiel "simpla eŭropa lingvo". Tio ankaŭ igus Esperanton pli konata por tute malsamaj celoj.



**B) Kie malsamaj grupoj havas tre malsamajn interesojn, necesas diplomatia mediacio. Esperantistoj kiuj havas, respektas kaj konservas komunan komprenon pri Homaranismo estas aparte kapablaj pri tio.** Tamen ĉi tiuj Esperantistoj devus esti fakuloj pri polemikaj aferoj, aŭ almenaŭ volonte okupiĝi pri ili kaj fari cel-orientitan penon. Tiam tio estus mesaĝo pri kio Esperanto povas evidente kaj klare esti kapabla. Kaj kelkaj aŭskultantoj respondus rimarkante tion, kion ni provas sugesti. Do bonvolu paroli "simplan Esperanton", tra ĉi tio eĉ povus starigi sin pli bone ol antaŭe kiel la "simpla eŭropa lingvo". Kaj kelkaj aŭskultantoj reagis rimarkante tion, kion ni provas sugesti: Bonvolu paroli "simplan Esperanton", kiu eĉ povus starigi sin pli bone ol antaŭe kiel la "simpla eŭropa lingvo". Tiel Esperanto ankaŭ estus pli konata kiel taŭga por tute malsamaj celoj.

**C) Aurelius Augustinus plurfoje emfazis bonfaradon kiel decidan forton.** Kaj li konvinke kaj intense luktis por aliro al sia Dio – malgraŭ ĉiuj duboj, ĉar la "signaloj de Dio" ne atingis lin eksplicite en klara lingvo. Li devis plurfoje mergi sin en neklarajn

antaŭsentojn kaj ĉerpi forton el neklaraj esperoj (!), kaj fortigi sian propran komunumon kiel Episkopo de Hipono. Ni povas demandi nin pri Homaranismo: Ĉu mankas al ni tia sindonemo?

## Kallebäck

### Malnova fonto en Gotenburgo – En gammal källa i Göteborg

de Ingegerd Granat



En bela printempa tago en 2025, ni faris ekskurson al la fonto de Kallebäck, kiu situas ĉe la regna ĉefŝoseo 40, kiu kondukas al Landvetter kaj plu en la mondon. Kaj kien ajn oni vojaĝas, akvo gravas, same grava en Jönköping kiel en Gran Canaria.

Jam en 1692, la fonto estas menciita por la unua fojo.

En la 18-a jarcento, ili komencis vendi puran kaj klaran akvon el la fonto en puraj ujoj, ĉe la Germana Preĝejo en Gotenburgo.

Post vizito al Gotenburgo, kiu komenciĝis la 13an de novembro 1787, reĝo Gustavo III daŭrigis sian vojaĝon direkte al la urbo Borås tra Kallebäck, kvar tagojn poste. Li estas renkontita ĉe la fonto de deputito de la Akvoprovizado-Komisiono de la grandurbo,

En vacker vårdag 2025, gjorde vi en utflykt till Kallebäck's källa som ligger vid riksväg 40 som leder till Landvetter och vidare ut i världen. Och vart man än reser, så är vatten viktigt, lika viktigt i Jönköping som på Gran Canaria.

Redan 1692 nämns källan för första gången.

På 1700-talet började man sälja rent och klart vatten från källan i rena kärl, vid Tyska kyrkan i Göteborg.

Efter ett besök i Göteborg, som började den 13 november 1787, fortsatte Gustav III sin färd mot Borås via Kallebäck, fyra dagar senare. Han möts vid källan av en deputation från stadens Vattenlednings-Commision, och händelsen beskrivs senare som mycket lyckad. Kungen avsmakar vattnet "på ett

kaj la okazaĵo poste estas priskribita kiel sukcesa. La reĝo gustumas la akvon "en kristala plado kaj el kristala glaso", la piedo de la glaso portanta la surskribon:

*La Najadoj de la fonto de Gustaf,  
al sia plej favora Reĝo,  
plej submetiĝeme la 17-an  
de Novembro 1787.*

En la inaŭguro, Daniel Pettersson profitis la okazon por peti nomigi la fonton "la fonto de Gustaf", kio estis permesita. Pettersson skribis kelkajn versojn, kiujn akvonimfo leviĝinta el la fonto laŭtlegis, kaj kiuj finiĝis per peto nomigi la fonton laŭ la reĝo:

*Via alveno, Nobla Reĝo, vizitante nian  
loĝejon.  
Viaj ekzemploj de Graco en la Libro de la  
Tempo multiĝos;  
Urbo amata de Vi, la sama preparita por ni,  
Al kiu Vi ankaŭ donis favoran aprobon.  
Kion la Antikvo deziris, la sorto volis savi  
Ĝis la tempo de Via Registaro, por ankaŭ  
esti, interalie  
Signo al ĉio utila kaj bona  
Prefere en la ŝirmejo de Via sceptro dezirata  
sukceso jam atingis;  
Sed kiam Via Moŝto etendas simplan manon  
Kion klaraj akvovejnoj donas, al tio etendiĝas  
nia preĝo.  
Ke plifortiĝu la memoro pri Via graco,  
Ke ni de nun ricevas la nomon la Fonto de  
Gustaf.*

Cetere, la "nimfo" faris tiel bonan impreson al la reĝo, ke "Lia Reĝa Moŝto, kiu, en atesto pri Sia kompleza favoro, prezentis al la prezentita Akvonimfo Oran medalon." Kaj la identeco de la nimfo kaj la sorto de la medalo estas nekonataj.

Oni ne povis ne rigardi enen, kaj jen kiel ĝi aspektis en ĉi tiu printempa tago.



Christalls-fat och utur ett Christalls-glas", där glasets fot har inskriptionen:

*Gustafs källas Naiader,  
till sin nådigaste Konung,  
underdånigast den 17  
November 1787.*

Vid invigningstillfället passade Daniel Pettersson på att be om att få kalla källan för Gustafs källa, vilket medgavs. Pettersson hade författat några verser som en ur källan stigen vattennymf läste upp och som avslutades med begäran om att få namnsätta källan efter kungen:



*Din ankomst, Dyre Kung, vår boning att  
besöka.*

*Skall Dina Nådes-prov i Tidens Bok föröka;  
En av Dig älskad Stad den samma oss berett,  
Vartill Du även ock ett nådigt bifall gett.  
Vad Forntid önskat har, har ödet velat spara  
Till Din Regerings-tid, att ock bland annat  
vara  
Ett vedermäle till att nyttigt allt och gott  
Hälst i Din spiras skygd har önskad framgång  
nått;  
Men när Ditt Majestät en ringa hand  
tillräcker*



La akvo ĉie estas la fluanta blanka oro!

La akvo de tiu fonto profitigis la mineralakvofabrikon de Gotenburgo "Apotekarnes" kaj la bierfarejon de Pripp.

"Gustafs Källa" estas fermita hodiaŭ, do ne povas kalkuli pri akvogluttoj.

*"Gustafs Källa" är idag stängd så någon vattenslurk går inte att räkna med. →*

Jen kio estas skribita sur la ŝildo ĉe la fonto:

La fonto de Kallebäck aŭ "fonto de Gustavo" kiun Gustavo III inaŭguris la 17-an de novembro 1787. La fonto metis la fundamenton por la akvoprovizado de Gotenburgo, tiutempe kun 11 000 loĝantoj.

La akvo de la fonto estis kondukita tra 5 km longa tubo de boritaj trunkoj, al fontano ĉe Kungspporten.

*Vad klara ådror ge, vår bön sig därtill sträcker.*

*Att minnet av Din nåd därmed befastas må,  
Att vi härefter namn av Gustafs Källa få.*

"Nymfen" gjorde för övrigt ett så bra intryck på kungen att "Hans Maj:t, som, till betygande av Dess nådiga välbehag överlämnade till den presenterade Vatten-Nymphen en Guldmedaille." Både nymfens identitet och medaljens öde är okända.

← Man kunde inte låta bli att titta in, och så här såg det ut denna vårdag.

Vattnet överallt är det rinnande vita guldet! Vattnet från denna källa har gynnat Göteborgs mineralvattenfabrik "Apotekarnes" och Pripps bryggeri.



Detta står på skylten vid källan:

Kallebäck's källa eller "Gustavs källa" som Gustav III invigde 17 nov. 1787. Källan lade grunden till vattenförsörjningen för Göteborg, på den tiden 11 000 innevånare.

Vattnet från källan leddes genom en 5 km lång ledning av urborrade trästockar, till en fontän vid Kungspporten.

Minnesstenen formgiven av CJ Carlberg 1800.

La memorŝtono dezajnita de CJ Carlberg en 1800.

Reĝo Gustavo V vizitis la fonton en 1937 por la 150-a datreveno kaj poste subskribis la memorŝtonon.

La fontodomo kaj la memorŝtono estis deklaritaj konstrua monumento en 1973.

Sub la desegnaĵoj dekstre:

La fonto de Gustaf ĉe Kallebäck, akvareldesegnaĵo de JG Richert, desegnita en 1881 lige kun renovigaj kaj vastiglaboroj.

Kung Gustav V besökte källan 1937 till 150 årsminnet och signerade då minnesstenen.

Källhuset och minnesstenen byggnadsminnesförklarades 1973.

Under ritningarna till höger:

Gustafs källa vid Kallebäck, akvarellmålad ritning av JG Richert, upprättad 1881 i samband med upprustnings- och utbyggnadsarbeten.



## La kreskado de barboj ĉe la Vikingoj

Barboj estas parto de vikinga kulturo dum jarcentoj. Foresto de barbo ne estis aprobata tiutempe, ĉar barbo estis vera signo de vireco kaj braveco. Unu el la plej karakterizaj trajtoj de la vikinga barbo estas la maniero kiel ĝi estas stiligita.

Ankaŭ hodiaŭ troviĝas homoj kiuj alte taksas la kulturon de la vikingoj. Oni fondas klubojn

por vigligi la vikingan kulturon. Interrete oni legas pri firmao, kiu produktas perlojn por fiksi en la barbo kaj perlojn por fiksi en la hararo.

El la libro **La lingvo de vikingoj**, kion legas Walter Klag en la sveda (jes vere!), estas linioj kiujn li ne komprenas. Ankaŭ mi ne tute komprenas ilin.

En *Vikingarnas Språk* de Rune Palm mi legis sur paĝo 213:



RUNE PALM  
VIKINGARNAS  
SPRÅK NORSTEDTS  
750-1100



***"På grund av hans bristande skäggväxt driver Gunnar på Lidarendes hustru Hallgerd med Njal."*** (Pro lia nesufiĉa barbokresko la edzino de Gunnar-på-Lidarende mokas Njal'on.)

Mi pensas ke la edzino de Gunnar, nomita Hallgerd, prenis parton por Njal, anstataŭ por sia edzo Gunnar. Njal kaj Gunnar estis najbaroj. Ili tempe estis malamikoj sed poste amikoj, solvante siajn malkonsentojn pace. Ŝajne la kreskado de la barbo estis pli forta ĉe Njal ol ĉe Gunnar. Tiam Hallgerd preferis Njal (tio estas mia interpreto, sed eble ne la ĝusta).

Walter skribas: ***Mi ne komprenas la rolon de "bristande skäggväxt" (manko de barba kreskado) en tiu epoko.***

Mi pensas ke Hallgerd preferis virecan partneron, kaj pensis ke dika barbo estus signo de vireco.

Kaj hodiaŭ?

***"Ĉu svedinoj ege ŝatas abundan 'skäggväxt'?***  
***Saluton al Svedio! – Walter"***

Kion vi respondus?



Pri la enhavo de ***Orm la Ruĝa*** pluraj personoj en Libro-Rondo ne ŝatas la batalemajn vikingojn – kun aŭ sen barboj.

Ni ĉesos la legadon kaj Zoom-diskutadon fine de aprilo. La Libro-Rondo trovos alian libron, sed paŭzos ĝis aŭgusto.

Propono pri nova libro estas "Anna de Verdaj Gabloj".

### **Ĉu vi volus partopreni?**

Demandas al vi

Siv

Mi fakte pensis ke la nordiaj dioj estis konataj en la kontinento – sed ne.

Do, antaŭ ol ni lasos *Orm la Ruĝa*, mi volus doni mallongan prezentadon de Oden, Tor kaj Freja.

Fakte, Frans G Bengtsson traktas periodon kiam pluraj religioj regis en Eŭropo: la kristana, la juda, la islama kaj la multaj dioj en la nordaj landoj.

Interese estas kiam la vikingoj miras pri moroj de la judoj kaj islamanoj: ne trinkas vinon, ne manĝas lardon. Kaj kial la kristanoj malŝatas judojn, dirante ke ili mortigis Jesuon antaŭ multaj, multaj jaroj. Kaj kial la islamanoj preĝis kun vizaĝo al la tero.

Mi antaŭe estis hezitema al la elekto de *Orm la Ruĝa*, sed malgraŭ la kruelaj faroj mi lernis pri la pensado kaj kulturo.

Kaj nuntempe – ĉu niaj estroj, regantoj, estas pli humanaj? Eble la Homaranismo, pri kiu Sonntag parolas estas ebla vojo iri, ke nur la kerno de ĉiuj religioj estas bezonata... k.t.p.

Zamenhof pensis ke oni povus konstrui templojn uzante nur la kernon de la religioj.

/Siv